

La Fino De Rattler

Kiam ni atingis la pueblon, mi vidis, kia ega ŝtonkonstruaĵo ĝi estis.

Laŭ la grimpiloj ni plialtiĝis ĝis la tria etaĝo, kie troviĝis la plej bonaj ĉambroj de la pueblo. Tie loĝis Intŝu-tŝuna kun siaj du gefiloj, kaj tie estis donataj ĉambroj ankaŭ al ni.

Mia loĝejo estis granda. Ĝi havis neniujn fenestrojn, kaj estis lumigata nur tra la pordo, sed tia porda malfermaĵo estis tiel vasta kaj alta, ke ne mankis heleco. La ĉambro malplenis, sed Nŝo-tŝi aranĝis ĝin por mi per felajoj, kovriloj kaj iloj tiel bone, ke mi povus farti tre komforte. Hawkens, Stone kaj Parker kune ricevis similan ĉambron.

Kiam mi „gastoĉambro“ estis tiel preta, ke mi povis iri en ĝin, „Bela Tago“ alportis belege skulptitan pacopipon, kaj ankaŭ tabakon. Ŝi plenigis ĝin mem por mi, kaj bruligis la tabakon. Kiam mi estis farinta la unuajn enspirojn, ŝi diris:

„Tiun kalumeton sendis al vi Intŝu-tŝuna, mia patro. Li mem alportis la argilon de ĝi el la sanktaj ŝtonejoj, kaj mi skulptis la tabakingon el ĝi. Ĝi ne jam estis en la buŝo de ajn iu homo. Ni petas vin, preni ĝin de ni kiel via posedaĵo, kaj pensi pri ni, ajn kiam vi fumos ĝin.“

„Via boneco estas granda“, mi respondis. „Ĝi preskaŭ hontigas min, ĉar mi ne povas respondi per samvalora donaco.“

„Vi jam donis al ni tiom multe, ke ni ne povas danki al vi sufiĉe, mi parolas pri la vivoj de Intŝu-tŝuna kaj Winnetou, mia frato. Pro tio niaj koroj ĉiam simpatias pri vi. Vi estu nia frato, se vi permesas, ke ni rigardas vin kiel nia frato.“

„Mi dankas al vi. Per tiu oferto mia plej granda deziro estas plenumita. Intŝu-tŝuna estas fama ĉefo kaj militisto, kaj Winnetou estis en mia koro jam ekde la unua momento. Estas granda honoro al mi, esti nomata la frato de tiaj viroj. Mi nur volus, ke ankaŭ miaj kunuloj ricevus la saman honorigon.“

„Se ili volas, ili estos rigardataj kiel naskitaj apaĉoj.“

„Ni dankas al vi pro tio. Do vi mem skulptis la tabakingon el la sankta argilo, ĉu? Kiel lertaj estas viaj manoj!“

Ŝi ruĝiĝis per tiu laŭdo.

„Mi scias, ke la virinoj kaj filinoj de la palvizaĝoj estas eĉ multe pli artspertaj kaj lertaj ol ni. Mi nun alportos ion kroman al vi.“

Ŝi iris, kaj alportis miajn revolverojn, mian tranĉilon, ĉiun municion kaj la aliajn aĵojn, kiuj ne estis estintaj en miaj poŝoj. Mi dankis, rimarkis, ke nun nenio mankis plu, kaj demandis:

„Ĉu ankaŭ miaj kunuloj rehavos ĉion, kio estis prenita de ili?“

„Jes, ĉion. Ili havas ĉion jam nun, ĉar dum mi servadas vin tie ĉi, Intŝu-tŝuna zorgas pri ili.“

„Kaj niaj ĉevaloj, ĉu?“

„Ili ankaŭ estas tie ĉi. Vi ree rajdos vian, kaj ankaŭ Sam Hawkens rehavos sian Maryn.“

„Vi konas la nomon de lia mulo, ĉu?”

„Jes, ankaŭ la nomon de lia malnova pafilo, kiun li nomas Liddy. Mi interparolis ofte kun li. Li estas tre sprita viro, sed tamen brava ĉasisto.”

„Jes, li estas, kaj eĉ fidela, oferiĝema kunulo, kiun oni devas ŝati. Sed mi volas demandi vin ion. Ĉu vi diros al mi la veron?”

„Nŝo-tŝi neniam mensogas”, ŝi respondis fiere.

„Ĉu viaj militistoj deprenis ĉion de la kajovajoj, kion ili kunportis?”

„Jes.”

„Ankaŭ de miaj tri kameradoj, ĉu?”

„Jes.”

„Kial ne ankaŭ de mi? Oni ne tuŝis la enhavon de miaj poŝoj.”

„Ĉar Winnetou, mia frato, ordonis tion.”

„Ĉu vi scias, kial li ordonis tion?”

„Ĉar li havis simpation pri vi.”

„Kvankam li pensis, ke mi estis sia malamiko, ĉu?”

„Jes. Vi ĵus diris, ke li estis en via koro ekde la unua momento. La sama kazo ankaŭ okazis al li pri vi. Ĝi tre dolorigis lin, devi supozi, ke vi estis lia malamiko, kaj ne nur malamiko —“

Ŝi ekĉesis, ĉar ŝi volis diri ion, kio certe ofendu min, laŭ ŝia opinio.

„Parolu plu!” mi petis.

„Ne.”

„Tiukaze mi pluos anstataŭ vi. Ke mi estis lia malamiko, tio ne povis dolorigi lin, ĉar oni povas ankaŭ estimi malamikon. Sed li kredis, ke mi estus mensogisto, trompema kaj intrigema homo. Ĉu tio ĝustas?”

„Vi ĝin diris.”

„Esperinde li nun komprenas, ke li eraris. Kaj unu demandon plu: kion vi faros kun Rattler, la murdinto de Klekih-petra?”

„Li ĵus estas fiksligata al la torturofosto.”

„Kio? Ĉu nun? Kaj oni ne diras tion al mi, ĉu? Kial oni silentis pri tio antaŭ mi?”

„Winnetou ĝin volis tiel.”

„Nu, sed kial?”

„Li kredas, ke viaj okuloj ne volas vidi, kaj viaj oreloj ne aŭdi tion.”

„Boneble li eĉ ne eraris pri tio. Kie la torturado okazas?”

„Malsupre, apud la rivero, kie ankaŭ vi estis. Intŝu-tŝuna forkondukis vin, ĉar vi ne ĉeestu.”

„Sed mi volas ĉeesti! Kiujn penojn oni elektis por li?”

„Ĉiujn, kiujn oni kutime faras al kaptitoj. Rattler estas la plej malica palvizaĝo, kiun la apaĉoj ajn iam kaptis. Li mortigis nian blankan patron, kiun ni estimis kaj amis, sen ia kaŭzo. Tial li mortu ne per nur kelkaj penoj, kiel ĝi estas tradicio pri aliaj kaptitoj, sed oni donos al ĉiujn torturojn, kiujn ni konas, unu post la alia.”

„Tio ne estu! Tio estas kruela!”

„Li meritas ĝin!”

„Ĉu vi rajtas ĉeesti, rigardi tion?”

„Jes.“

„Vi, knabino!“

Ŝiaj longaj okulharoj malleviĝis. Ŝi direktigis la vidon al la tero kelkan tempon, relevis ĝin, vidis preskaŭ riproĉe en miajn okulojn, kaj respondis: „Ĉu vi miras pri tio?“

„Jes. Virino ne estu permesata vidi tion.“

„Ĉu tio estas kutimo ĉe vi?“

„Jes.“

„Vi eraras.“

„Ĉu vi volas aserti la malon?“

„Jes.“

„Tiukaze vi konu niajn virinojn kaj knabinojn pli bone ol mi!“

„Eble vi ne konas ilin! Kiam viaj krimuloj staras antaŭ la juĝisto, aliaj homoj rajtas ĉeesti. Ĉu tio ĝustas?“

„Jes.“

„Mi aŭdis, ke kutime ĉeestas pli da aŭskultantinoj ol aŭskultantoj. Ĉu virinoj ne rajtas esti tie? Kaj kiam murdisto estas mortigata ĉe vi, ĉu tiam neniuj blankaj *squaw*-oj ĉeestas?“

„Tiel ĝi estis, iam.“

„Ĉu ĝi nun estas malpermesata al ili?“

„Jes.“

„Kaj ankaŭ la la viroj, ĉu?“

„Jes.“

„Do ĝi estas malpermesata al ĉiuj! Se estus permesata al ili, ankaŭ la *squaw*-oj ĉeestus. Ho, la virinoj de la palvizaĝoj ne estas tiel mimozaj, kiel vi pensas. Ili povas elteni la penojn tre bone, la penojn, kiujn sentas aliaj, bestoj aŭ homoj. Me ne estis ĉe vi, sed Klekih-petra rakontis tion al mi. Ankaŭ Winnetou iris en la grandajn urbojn de la oriento, kaj kiam li estis reveninta, li raportis al mi ĉion, kion li vidis.“

„Kion li raportis al vi?“

„Ĉu viaj *squaw*-oj ne ĉesidas milope, kiam ĉevaloj estas mordrajdataj, dum vetkuradoj? Ĉu ne ĉeestas *squaw*-oj, kiam boksistoj interbatiĝas ĝissange? Mi estas juna, sensperta knabino, kaj vi pensas, ke mi estas unu el la sovaĝuloj, sed mi povus diri al vi multajn aĵojn plu, kiujn viaj mildanimaj *squaw*-oj faras, senke ili sentas la hororon, kiun sentus mi.“

Mi konis la junan belan indianinon kiel trankvila, kvieta virino. Nun ŝi staris antaŭ mi, kun brilantaj okuloj kaj ardaĵ vangoj, la vivanta bildo de venĝodiino, kiu ne konas kompaton. Ĉu mi rajtis juĝi pri ŝi? Ĉu ŝi ne pravis?

„Mi nun iras, kaj rigardos, kiel la murdinto de Klekih-petra ricevas sian punon“, Nŝo-tŝi diris finige.

„Nu bone“, mi diris. „Sed mi kuniras.“

„Pli bone restu tie ĉi!“ ŝi petis, ree parolante per tuta alia sono. „Intŝu-tŝuna kaj Winnetou ne ĝin ŝatus, se vi kunvenus.“

„Ĉu tio ĉagrenos ilin?“

„Ne. Ili ne deziras ĝin, sed ankaŭ ne malpermesos ĝin al vi. Vi estas nia frato.“

„Tiukaze mi kuniros. Ili pardonos min.“

Kiam mi elpaŝis kun ŝi sur la platformon, Sam Hawkens staris tie. Li fumis sian malnovan, mallongan savanpipon, ĉar ankaŭ li ricevis tabakon.

„Vere estas alia afero nun, *Sir*“, li diris ridete. „Antaŭ mallonge nur ni estis kaptitoj, sed nun ni estas noblaj sinjoroj. Tio estas diferenco. Kiel Vi fartas per la novaj cirkonstancoj?“

„Dankon, bone“, mi respondis.

„Ankaŭ mi, bonege. La ĉefo mem regalis nin. Ja bonegas, se mi n'eraras!“

„Kie li estas nun?“

„For, reiris al la rivero.“

„Ĉu Vi scias, kio nun okazas tie?“

„Mi povas elpensi ĝin. Karesa adiaŭado de la karaj kajovajoj.“

„Malpli. Rattler estu torturata.“

„Rattler estu torturata, ĉu? Kaj oni kondukis nin tien ĉi! Mi ĉestu! Venu, *Sir*! Ni rapide iru malsupren.“

„Ne tiel haste! Ĉu Vi povas rigardi tian spektaklon, senke la hororo forpelos Vin?“

„Ĉu hororo? Kia greenhorn Vi ja estas, *Sir*! Tiu ulo meritas la morton, kaj estos mortigata en indiana maniero. Tio estas ĉio!“

„Sed estas kruelaĵo.“

„*Psham!* Ne parolu pri kruelaĵo je tiu subjekto! Li mortu ĉiel. Aŭ ĉu Vi eĉ ne konsentas pri tio?“

„Nu, sed jes. Sed ili ĝin faru mallonge! Li estas homo!“

„Ulo, kiu mortpafas alian, kiu tute ne faris ion al li, ne plu estas homo. Krome li estis ebric kiel besto.“

„Ja tio estas kaŭzo de plimildigo! Li ne konsciis pri kio li faris.“

„Ne ridigi min pri Vi! Ajn kiu drinkadas tiel sence, ke li atakas sian kunhomon, estu punata duoble! Mi ne sentas la plej etan kompaton pri tiu Rattler. Nu, memoru, kiel li traktis Vin!“

„Mi ĝin memoras, sed mi estas kristano, kaj ne indiano. Mi provos ĉion, pro ebligi rapidan ekmorton al li.“

„Rezignu pri tio, *Sir*! Unue li ne meritas ĝin, kaj due ĉiuj Viaj klopodoj estos vanaj. Klekhipetra estis la instruisto, la spirita patro de la tribo. Lia morto estas neanstataŭigebla perdo al la apaĉoj. La murdo okazis sen ajn ia kaŭzo. Per tiuj kaŭzoj estas nebla al la ruĝuloj, pensiĝi pri mildigo de la puno.“

„Mi ĝin provos tamen!“

„Sed vane!“

„Tiukaze mi pafos kuglon en la koron de Rattler.“

„Pro finigi liajn dolorojn, ĉu? Rezignu pri tio, pro la graco de Dio! Vi igus la tutan tribon via malamiko per tio. Estas la bona rajto de la apaĉoj, difini la manieron de la puno. Se Vi maleblos tiun rajton al ili, la juna amikeco estos tuj finigata. Do, ĉu Vi kuniras?“

„Jes.“

„Bone. Sed ne ekhavu la ideon fari stultaĵon. Mi vokos Dick:on kaj Will:on.“

Li malaperis en la eniron de sia loĝejo, kaj baldaŭ revenis kun siaj kunuloj. Ni malaltiĝis laŭ la grimpiloj. Nŝo-tŝi estis antaŭirinta. Kiam ni venis en la flankan valon de la Rio Pecos, ni ne

plu vidis la kajovajojn. Ili estis forrajdintaj kun ilia lezita ĉefo. Intŝu-tŝuna estis tiel prudenta, sendi esploristojn post ili, ĉar eblis, ke ekideis al ili kaŝe reveni pro venĝiĝi.

Nia bovĉaro ankoraŭ estis sur la loko sur la rivera bordo. Kiam ni venis, la apaĉoj staris en vasta cirklo ĉirkaŭ la ĉaro. En la mezo de la cirklo staris la du ĉefoj kun kelkaj militistoj. Nŝo-tŝi estis ĉe ili, kaj interparolis kun Winnetou. Kvankam ŝi estis filino de la ĉefo, ŝi ne rajtis enmiksiĝi en la aferojn de la viroj. Se ŝi nun tamen ne troviĝis inter la aliaj virinoj, ĝi certe ne estis iu negravaĵo, kiun ŝi diris al sia frato. Kiam ŝi vidis nin veni, ŝi atentigis lin pri ni, kaj tiam foriĝis al la *squaw*-oj. Do ŝajnis, ke ŝi parolis al li pri ni.

Winnetou iris tra la cirklaĵo de siaj militistoj, venis renkonte al ni, kaj serioze diris:

„Kial miaj blankaj fratoj ne restis en la pueblo? Ĉu ili ne ŝatas la loĝejon, en kiujn ili estis kondukitaĵ?“

„Ili plaĉas al ni. Ni dankas al nia ruĝa frato pro lia prizorgado. Ni revenis, ĉar ni aŭdis, ke Rattler nun ekmortu. Ĉu ĝi estas tiel?“

„Jes.“

„Sed mi ne vidas lin!“

„Li kuŝas en la ĉaro, ĉe la korpo de la murdito.“

„Kiun mortigon li suferu?“

„La torturan mortigon.“

„Ĉu tio estis decidita certe? Mia religio postulas al mi, peti pro Rattler.“

„Via religio, ĉu? Ĉu ĝi ne estas la sama kiel lia?“

„Ĝi estas.“

„Ĉu li agis laŭ ĝiaj leĝoj?“

„Bedaŭrinde ne.“

„Via kaj lia religio malpermesas murdon. Tamen li murdis, do la leĝoj de via religio ne efikigendas pri li.“

„Mi ne agu laŭ la fiagoj, kiujn faris Rattler. Mi plenumu mian devon, sen demandi pri la pensmanieroj aŭ la agoj de alia homo. Mi petas vin mortigi lian vivon en rapida maniero!“

„Aĵn kio estis decidata, tio farendas!“

„Ĉu nepre?“

„Jes.“

„Do ekzistas neniu rimedo, plenumi mian deziron, ĉu?“

Li vidis serioze, kaj pripense al la tero. Tiam li respondis:

„Ekzistas unu. Antaŭ mi diros ĝin al mia blanka frato, mi petu lin, pli bone ne insisti pri ĝi. Ĝi povus endanĝerigi mian blankan fraton inter niaj militistoj.“

„Mi ne komprenas tion.“

„Ili ne povus estimi vin tiel, kiel mi ĝin dezirus pro vi.“

„Do tiu rimedo estas supozata senhonora kaj malestimenda, ĉu?“

„Laŭ la supozo de la ruĝa viro, jes.“

„Ĝin diru al mi!“

„Vi apelaci al nia dankemeco.“

„Mi komprenas. Tion sed neniu viro faras, ĉu?“

„Jes. Ni ŝuldas nian vivon al vi. Se vi volus memoriĝi tion, vi devigus Intŝu-tŝunan kaj min agi laŭ via deziro.“

„Kiel tio realiĝos?“

„Ni devus fari denovan interkonsilon, kaj tiel paroli pro vi, ke niaj militistoj agnosku la dankon, pri kiu vi insistas. Sed tiukaze ĉio, kion vi faris, estus egaligata kaj senvalorigata. Ĉu tiu Rattler meritas tian oferaĵon?“

„Certe ne!“

„Mia frato aŭdas, ke mi parolas al li malkaŝe. Mi scias, kiuj pensoj kaj sentoj loĝas en lia koro. Sed miaj militistoj ne komprenus tiujn sentojn. Homo, kiu postulas dankon, estas malestimota de ili. Ĉu Old Shatterhand devu jam hodiaŭ foriri de ni, ĉar miaj militistoj kraĉus sur la teron antaŭ li?“

Estis malfacila respondi al tio. Mia prudento kaj mia fiero kontraŭis. Winnetou povis senti tiun necertecon.

„Mi interparolos kun Intŝu-tŝuna, mia patro“, li diris. „Mia frato atendu tie ĉi!“

Li foriris.

„Ne faru stultajon, *Sir!* Sam petis. „Vi tute ne scias, kio tio signifos.“

„Ne povas signifi multajn aĵojn.“

„Sed jes! Ĝi veras: la ruĝuloj malestimas ĉiun, kiu malkaŝe postulas dankon de ili. Ili ja certe faros, kion oni volis de ili, sed poste ili ne volas scii ion pli de tiu homo. Fakte ni estus forigontaj jam hodiaŭ, kaj tiam havus la malamikajn kajovojojn kontraŭ ni. Kio tio signifus, mi ja ne devas klarigi.“

Intŝu-tŝuna kaj Winnetou interparolis kelkan tempon. Poste ili venis al ni.

La ĉefo komencis:

„Se Klekih-petra ne estis klariginta tiom multan al ni pri via religio, mi supozus vin esti viro, kun kiu estus malglorigo interparoli. Sed tiel mi komprenas vian deziron. Sed miaj militistoj ne komprenos vin, kaj tial vin malestimos.“

„Ĝi ne nur estas mi, sed ankaŭ Klekih-petra, pri kiu vi parolas.“

„Kial pri li?“

„Li havis la saman religion, kiu nun igas min peti vin, kaj li mortis kun tiu kredo. Lia religio postulis al li, pardonu liajn malamikojn. Se li ankoraŭ vivus, li certe ne tolerus, ke sia murdisto ekmortu en tia maniero.“

„Ĉu vi vere kredas tion?“

„Jes, mi certas pri tio.“

Li skuis la kapon malrapide.

„Nu kiaj homoj tiuj kristanoj estas! Aŭ ili estas tiel malbonaj, ke oni ne povas kompreni ilian malbonecon. Aŭ ili estas bonaj, kaj tiam ilia boneco estas tiel granda, ke oni same ne povas kompreni ilian bonecon!“

Li interŝanĝis kelkajn vidojn kun Winnetou. Ili komprenis unu la alian. Ili interparolis nur per la okuloj. Tiam Intŝu-tŝuna returniĝis al mi.

„Ĉu tiu murdisto estis ankaŭ via malamiko?“

„Jes.“

„Ĉu vi pardonis lin?“

„Jes.“

„Tiukaze aŭskultu, kion mi diros al vi! Ni vidu, ĉu nur unu eta restaĵo de boneco loĝas en li. Se tio estas la kazo, mi provos plenumigi vian deziron, senke vi estos endanĝerigataj. Sidiĝu tien ĉi, kaj atendu. Kiam mi signos al vi, vi venu al Rattler, kaj postulu de li, ke li petu vian pardonon. Se li faros tion, li ekmortu rapide.“

„Ĉu mi rajtos diri tion al li?“

„Jes.“

Intŝu-tŝuna reĝis en la cirklajon kun Winnetou. Ni sidiĝis sur la lokon, kie ni staris.

„Mi ne pensis, ke tio eblus“, Sam diris. „La ĉefo respektas Vian deziron. Li tre verŝajne ŝatas Vin.“

„Eble. Sed mi supozas, ke krome ekzistas alia kaŭzo! Estas la influo de Klekih-petra, kiu eĉ gravas post lia morto. Mi scivolas, kio okazos nun.“

„Ni ĝin vidos. Nur atentu!“

Nun la kovrilo de la ĉaro estis deigata. Ni vidis, ke oni prenis longan, valizan aĵon de ĝi, sur kiu estis fiksligita homo.

„Estas la ĉerko“, Sam Hawkens diris. „Farita el fajre sekigitaj arbopecegoj, kaj kovrita per malsekaj feloj. Kiam la ledso sekiĝas, ĝi kuniĝas, kaj tiel la ĉerko estas fermata aerdense.“

Neproksime de la loko, kie la flanko valo iĝis al tiu de la Rio Pecos, estis roko, sur kiu estis kunmetita malferma kvarangulo el grandaj ŝtonoj. Flanke de ĝi krome kuŝis multaj ŝtonoj, kiun oni estis surstokigitaj tie. Al tiu ŝtona kvarangulo oni nun portis la ĉerkon kun la homo, kiu estis fiksligata sur ĝin. Tiu homo estis Rattler.

„Ĉu Vi scias, kial oni amasigis la ŝtonojn tie?“ Sam demandis.

„Mi povas ĝin pensi. Oni volas konstrui la tombon el ili.“

„Ĝuste! Duoblan tombon.“

„Ankaŭ por Rattler, ĉu?“

„Jes. La murdisto estos enterigata kune kun sia viktimo. Tute ne malbona ideo!“

„Hororige! Esti vivante fiksligata al ĉerko de murdito, kaj scii certe dum tio, ke tio estos ankaŭ la propra lasta restejo!“

„Mi preskaŭ pensas, ke vi eĉ bedaŭras tiun homon! Ke vi petis pro li, tion mi povas kompreni, sed kiel oni povas senti kompaton pri li, tion mi komprenas vere ne.“

Nun la ĉerko estis levata tiel, ke Rattler estis starigata sur siajn piedojn. Oni fiksligis ambaŭ, la ĉerkon kaj la homon, per dikaj rimenoj al la ŝtonmuro. La ruĝuloj, viroj, virinoj kaj infanoj proksimiĝis, kaj stariĝis duoncirkle ĉirkaŭe. Estis profunda, ekspektoplena silento. Winnetou kaj Intŝu-tŝuna staris flanke de la ĉerko, unu dekstre, la alia maldekstre. Nun la ĉefo laŭtigis sian voĉon:

„La militistoj de la apaĉoj kunvenis tie ĉi pro juĝado, ĉar la popolo de la apaĉoj suferas grandan mankon, kiun la kulpulo pagu per sia vivo.“

Intŝu-tŝuna pluparolis. Li paroladis en la bildoriĉa maniero de la indianoj pri Klekih-petra, lia karaktero kaj liaj agoj, kaj tiam rakontis detale, kiel la murdo okaziĝis. Li raportis pri la kapto de Rattler, kaj fine sciigis, ke la murdinto nun estu torturata, kaj poste enterigota kune kun la mortulo, fiksligate sur la ĉerko. Tiam li vidis al mi, kaj donis al mi la atenditan signon.

Ni starigis, kaj iris en la mezon de la cirklaĵo. Antaŭe mi ne povis klare vidi la kondamniton pro la malproksimeco. Nun mi staris antaŭ li, kaj sentis profundan kompaton pri Rattler, kvankam mi havis nenium kaŭzon pro tio.

La ĉerko, kiu estis starigita sur la piedan finiĝon, estis pli ol duoble larĝa kiel homo, kaj pli ol du metrojn longa. Ĝi aspektis, kvazaŭ oni desegis egan pecon de dika arbotrunko, kaj kovris ĝin per ledon. Rattler estis fiksita sur ĝin, kuŝante sur la dorso. Liaj brakoj estis igitaj malantaŭen, kaj liaj piedoj disen. Oni povis vidi, ke li ne estis devinta nek malsaton nek soifon. Estis ŝtopilo en lia buŝo. Do li ne povis paroli ĝis nun. Ankaŭ lia kapo estis fiksita tiel, ke li ne povis movi ĝin. Kiam mi venis, Intŝu-tŝuna prenis la ŝtopilon el lia buŝo, kaj diris al mi:

„Mia blanka frato volis paroli al tiu murdisto. Ĝi okazu!“

Rattler vidis, ke mi estis libera. Do li eksciis, ke mi amikiĝis kun la indianoj. Tial mi kredis, ke li petus min efikigi pli mildan punon de la indianoj. Sed anstataŭ li ekparolis al mi kolere, ĵus kiam la ŝtopilo estis elprenita:

„Kion Vi volas de mi? Foriĝu! Ne endas al mi ion fari kun Vi!“

„Vi aŭdis, ke Vi estas kondamnita je morto, *Mr. Rattler*“, mi respondis trankvile. „Tio ne estas ŝanĝebla. Vi ekmortu ĉiukaze. Sed mi volas, ke Vi—“

„For, hundo, for!“ li ĉesigis min, kaj kraĉis al mi, sed ne trafis min, ĉar li ja ne povis movi la kapon.

„Vi do devas ĉiukaze“, mi pludiris senkonfuzite, „sed en kia maniero, tio dependas de Vi. Vi estu torturota ĝismorte. Tio signifas, ke oni turmentos Vin longe, eble nur hodiaŭ, sed eble ankaŭ morgaŭ, la tutan tagon. Tio estas hororiga. Intŝu-tŝuna deklaris sin bonvole pri mia peto, ke oni lasos Vin ekmorti rapide, se Vi plenumos unu kondiĉon, kiun li dependigis de tio.“

Mi atendis momenton, ĉar mi pensis, ke li demandus min pri tiu kondiĉo. Anstataŭ li elpuŝis terurigan malbenaĵon al mi.

„Tiu kondiĉo estas, ke Vi petas mian pardonon“, mi klarigis plu.

„Ĉu pardonon? Ĉu peti Vian pardonon?“ li kriis. „Pli prefere mi demordos mian langon, kaj suferos ĉiujn penegojn, kiujn tiuj ruĝaj friponoj povas elpensi!“

„Atentu bone, *Mr. Rattler*, ne estis mi, kiu difinis tiun kondiĉon. Mi ne bezonas Vian pardonpeton. Intŝu-tŝuna ĝin volis, kaj nur ĉar mi diru ĝin al Vi, mi diras ĝin al Vi. Pripensu, en kia situacio Vi estas, kaj kio okazos al Vi! Vi travivos hororegon, tute teruran manieron de ekmorto, kiun Vi povus eviti, se Vi nur dirus tiun unu vorton ‚pardonu‘.“

„Ne ekideos al mi, neniam, neniam! Foriĝu de tie ĉi! Mi ne volas vidi Vian friponan vizaĝon plu! Iru al la diablo, kaj pro mi eĉ pli for!“

„Se mi plenumos Vian volon, kaj foriros, ĝi estos tro tarda por Vi. Mi poste neniam revenos. Do estu prudenta, kaj diru la vorton!“

„Ne, ne, kaj ne!“ li kriegis.

„Mi petas Vin pri tio!“

„For, for, mi diras! Ĉielo kaj infero, kial mi estas fiksligita! Se miaj manoj ne liberus, mi montrus al Vi la vojon!“

„*Well*, okazu Via volo. Sed mi diras al Vi, ke mi ne revenos, se Vi vokos min pli poste.“

„Ĉu mi, ĉu vokos Vin? Ne iluzii tion! Foriĝu tuj, mi diras!“

„Bone, mi iros. Sed antaŭe ion alian: ĉu Vi ankoraŭ havas deziron? Mi plenumos ĝin. Ĉu saluton al ajn iu? Ĉu Vi eble havas parencojn, al kiuj mi sendu mesaĝon?“

„Iru en la inferon, kaj tie diru, ke Vi estas damnenda fripono! Vi aliancis kun tiuj ruĝuloj, kaj donis min sub ilian forton. Pro tio mi—“

„Vi eraras“, mi interrompis lian parolon. „Vi do havas neniun lastan deziron antaŭ Via morto, ĉu?“

„Nur tiun, ke ĝi ankaŭ baldaŭ okazu al Vi!“

„Bone, ni do estas kvitiĝintaj. Ne plu endas fari al mi ion, escepte de konsili al Vi kiel kristano: pensu pri Viaj agoj, kaj pri la repago, kiun Vi donu en la transejo!“

Kion li respondis al tio, tion mi ne povas skribi. Glacimalvarma sento iris malsupren laŭ mia dorso dum tio. Intŝu-tŝuna preni mian manon, kaj forkondukis min.

„Mia juna blanka frato vidas, ke tiu murdisto ne meritas propeton. Vi nomas nin paganoj, sed ĉu ruĝa militisto eldirus tiuj vortojn?“

Mi ne respondis. Mi ne estis ekspektinta la konduton de Rattler. Ne mallonge antaŭe, li ĉiam estis ekstreminta, kiam oni estis parolanta pri la torturofosto de la indianoj. Kaj jam hodiaŭ li agis, kvazaŭ ĉiuj penegoj de la mondo valorus nenion al li.

„Tio ja ne estas kuraĝo“, Sam diris, „sed kolero, nenio sed kolero. Li pensas, ke estas Via kulpo, ke li estas igita sub la forto de la apaĉoj. Li ne estis vidinta Vin ekde la tago, je kiu ni estis kaptataj. Nun li rimarkas, ke ni ĉirkaŭiras libere. La ruĝuloj estas amikecaj al ni, dum li ekmortu. Tio estas sufiĉa kaŭzo al li pro pensi, ke ni intrigis kontraŭ li. Sed nur atendu la komencon de la torturado, tiam li kantos tute alie, se mi n'eraras!“

La apaĉoj ne longe lasis nin atendi la komencon de la malgaja spektaklo. Fakte mi volis foriri, sed mi neniam antaŭe vidis tian aĵon, kaj do decidis resti tiel longe, kiel mi povus elteni ĝin.

La septantoj sidiĝis. Pluraj junaj militistoj, kun tranĉiloj en la manoj, aperis, kaj stariĝis ĉirkaŭ kvin dek metrojn antaŭ Rattler. Ili ĵetis la tranĉilojn al li, sed evitis trafi lin. La klingoj ĉiuj iĝis en la ĉerkon, sur kiun li estis fiksligita. La unua tranĉilo eniĝis maldekstre, la dua dekstre de lia piedo, tiel proksime, ke preskaŭ ne estis aero intere. La du sekvaj tranĉiloj estis celitaj pli alten. Tiel ĝi daŭriĝis, ĝis liaj kruroj estis randumitaj dense de kvar tranĉilaj vicoj.

Ĝis nun li estis konduktinta sufiĉe bone. Sed nun la tranĉiloj enflugegis ĉiam pli alte. La tasko estis, imiti la konturon de la korpo per tranĉiloj. Li timis. Ĉiufoje, kiam tranĉilo estis ĵetata al li, li elpuŝis timkrion. La krioj iĝis des pli laŭtaj kaj altaj, ju pli alten la indianoj celis.

Kiam ankaŭ la supra parto de la korpo estis ĉirkaŭita de tranĉiloj, ili celis al la kapo. La unua tranĉilo iĝis en la ĉerkon dekstre de lia kolo, la dua maldekstre. La sekvintaj eniĝis laŭ ambaŭ flankoj de la kapo ĝis la hardislino, ĝis ne plu estis spaco por kroma klingo. Tiam ĉiuj tranĉiloj estis eltirataj. Tio estis estinta nur antaŭludo. La junaj militistoj nur devis montri, ke ili povis trankvile celi, kaj certe trafi. Ili iris al la cirklajo, kaj sidiĝis.

Nun Intŝu-tŝuna elektis pli maljunajn militistojn, kiuj ĵetu el distanco de tridek paŝoj. Kiam la unua pretis, la ĉefo iris al Rattler, montris al lia dekstra brako, kaj ordonis:

„Trafu ĉi tien.“

La tranĉilo alflugis, trafis ekzakte la montritan punkton, kaj iĝis tra la muskolo en la ĉerkon. Tio estis serioza. Rattler sentis la doloron, kaj elpuŝis kriadon, kvazaŭ li jam estus trafita mortodanĝere. La dua tranĉilo iĝis tra la alia brako. La kriado duobliĝis. La tria kaj kvara ĵeto estis celitaj al la femuroj, kaj ankaŭ trafis ekzakte la punktojn, al kiuj la ĉefo estis montrinta antaŭe. Oni ne vidis sangon flui, ĉar Rattler ne estis senvestigita, kaj ĉar la indianoj nur celis al tiuj lokoj, kie la lezaĵoj ne povis kaŭzi ian danĝeron, do ne mallongigon de la spektaklo.

Eble Rattler estis pensinta ĝis nun, ke oni ne vere tiel serioze intencis lian mortigon. Nun li devis kompreni, ke tiu supozo estis malĝusta. La sekvintajn tranĉilojn li ricevis en la malsuprajn brakojn, kaj la kruojn. Antaŭe li nur estis elpuŝinta unuopajn kriojn, sed nun li kriadis senĉese.

La spektantoj grumblis, interflustris, kaj esprimis ilian malestimon en diversaj manieroj. Sur la torturofosto, indiano ĝenerale kondutas tute alie. Kiam komencas la spektaklo, kiu finiĝu per lia morto, li ekkantas sian mortokanton, per kiu li laŭdas siajn agojn, kaj mokas pri siaj torturantoj. Ju pli ardiĝas la doloroj, kiujn oni donas al li, des pli egiĝas la ofendoj, kiujn li reĵetas al ili. Neniam li elpuŝas plendon, aŭ laŭtigas dolorkrion. Kiam li tiam mortas, liaj kontraŭuloj deklaras lian gloron, kaj enterigas lin per ĉiuj indianaj honorigoj.

Alia afero estas tiu de malkuraĝulo, kiu ekkrias je ĉiu maldanĝera lezo, kaj petaĉas pri kompatato. Torturi tian ulon ne estas honoro, sed preskaŭ hontego. Tial finfine ne plu troveblos unu militisto, kiu pretas okupiĝi pri li, kaj li estos mortbatata, aŭ en ajn alia senhonora maniero transigata de vivo en morton.

Tia malkuraĝulo estis Rattler. Liaj lezaĵoj ne jam estis seriozaj. Certe ili ja kaŭzis dolorojn al li, sed oni ne jam povis paroli pri turmentoj. Tamen li kriis kaj veis, kvazaŭ li sentus ĉiun turmenton de la infero. Dum tio li ĉiam refoje vokegis mian nomon.

Mi devis iri al li.

Intŝu-tŝuna ordonis paŭzon, kaj petis min:

„Mia juna blanka frato demandu lin, kial li kriadas tiel. La tranĉiloj ĝis nun neeble povis kaŭzi al li doloron.“

„Jes, venu, *Sir*, venu! Mi parolu kun Vi!“

Mi iris al li, kaj demandis:

„Kion Vi volas de mi?“

„Tiru la tranĉilojn el miaj brakoj kaj kruoj!“

„Tion mi ne rajtas.“

„Sed mi ja ekmortos per ili! Kiu povas travivu tiom multajn lezojn?“

„Strange. Ĉu Vi do kredis, ke Vi travivos tion ĉi?“

„Sed Vi ja ankaŭ vivas!“

„Mi murdis neniun!“

„Ne estis mia kulpo, ke mi faris ĝin! V ja scias, ke mi ebris!“

„Tio ŝanĝas nenion pri Via ago. Mi avertis Vin ofte pri la brando. Vi ne atentis, kaj nun devas akcepti la konsekvencojn.“

„Vi estas kruda, kaj senkora homo! Bonvolu petu pro mi!“

„Mi faris tion. Petu mian pardonon, kaj Vi estos mortigata rapide, kaj ne plu turmentata.“

„Ĉu ekmorti rapide? Sed mi ne volas ekmorti! Mi volas vivi, vivi, vivi!“

„Tio neblas.“

„Neeblas, ĉu? Do ne eblas savo?“

„Ne.“

„Ne eblas savo — ne, ne!“

Li vokegis tion per ĉiu forto, kaj tiam rekomencis vekriadon kaj plendaĉon, ke mi ne plu povis elteni star ĉe li.

„Sed, restu, *Sir*, restu ĉe mi!“ li vokis al mi. „Alie ili rekomencos torturi min!“

La ĉefo bruskis al li:

„Ne plu fikriu, hundo! Vi estas fiodoranta kojoto, kiun neniu militisto plu volas tuŝi eĉ ne per la armilo.“

Li turniĝis al siaj anoj:

„Kiu el la filoj de la apaĉoj volas okupiĝi pri tiu malkuraĝulo plu?“

Neniu respondis.

„Neniu, ĉu?“

Denove silento, kiel antaŭe.

„Uf! Tiu murdisto ne meritas esti mortigata de ni. Ankaŭ li ne estu enterigota kune kun Klekih-petra. Kiel ĝi aspektos, kiam tia bufo aperu flanke de la cigno en la ĉiamaj ĉasejoj! Detranĉu lin!“

Li mansignis al du junulaj knaboj. Ili tuj ekstaris, jen kuris, tiris la tranĉilojn el la membroj, kaj liberigis lin de la ĉerko.

„Fiksligu liajn brakojn sur la dorso!“ la ĉefo ordonis.

La knaboj, kiuj ne estis pli aĝaj ol dekjare, obeis.

Rattler ne riskis eĉ la plej etan kontraŭon. Kia malhonoro! Mi preskaŭ hontis esti blankulo.

„Konduku lin al la riero, kaj puŝu lin en la akvon!“ sonis la sekvanta ordono. „Se li atingos la transan bordon, li estu libera.“

Rattler elpuŝis ĝojkrion, kaj lasis sin konduki al la rivero de la knaboj. Ankaŭ ili fakte enpuŝis lin. Li eĉ ne posedis tiom da dignosento ensalti mem. Unue li ensinkis, sed baldaŭ reaperis je la supraĵo, kaj penegis naĝante antaŭiĝi, kun la dorso turnite suben. Tio ne malfacilis, kvankam liaj manoj estis fiksligitaj sur lia dorso. Li povis antaŭiĝi per la kruroj.

Ĉu li estis permesata atingi la transan bordon sen danĝero? Mi mem ne deziris tion. Li meritis la morton. Se oni lasis lin pluvivi, kaj eĉ fuĝi, oni ja eĉ kunkulpiĝis per la krimaĵoj, kiujn li estonte farus. La du knaboj staris proksime apud la akvo, kaj rigardis lin. Tiam Intŝu-tŝuna ordonis al ili:

„Prenu pafilojn, kaj pafu en lian kapon!“

Ili kuris al la loko, kie kelkaj militistoj surterigis iliajn pafilojn, kaj ĉiu el ili prenis unu. La malgrandaj junuloj sciis ekzakte, kiel oni devis trakti tiujn armilojn. Ili surgenuiĝis sur la bordo, kaj celis al la kapo de Rattler.

„Ne pafu, pro la volo de Dio, ne pafu!“ li kriis ekterurigite.

La knaboj interparolis. Ili mallevis la pafilojn, kaj lasis Rattler:on naĝi pli for. Intŝu-tŝuna faris nenion kontraŭ tio. Mi vidis, ke ili sciis ekzakte, ĉu ili povis pafi, aŭ ne. Subite ili elpuŝis

kuraĝigan vokegon per iliaj altaj infanvoĉoj, kaj lanĉis la pafilojn. Rattler estis trafata en la kapon, kaj tuj malaperis sub la akvosupraĵo.

Neniu eksoniigis ĝojkrion, kiel ĝi estas kutimo de la ruĝuloj, kiam malamiko estas mortigita. Malkuraĝulo kiel Rattler ne meritis, ke oni laŭtigis nur unu etan elvokon pro li. La malestimo de la indianoj estis tiel granda, ke ili tute ne okupiĝis pri lia kadavro. Ili lasis ĝin naĝiĝi laŭ la fluo, sen eĉ vidi al ĝi plu.

Intŝu-tŝuna venis al mi, kaj demandis:

„Ĉu mia juna blanka frato nun kontentas pri mi?“

„Jes. Mi dankas al vi!“

„Vi ne devas danki al mi. Eĉ se mi ne estus koninta vian deziron, mi estus aginta sammaniere. Tiu hundo tute ne meritis ekmorti sur la torturfosto. La palvizaĝoj kapablas fari ĉian malican agon, sed kiam ili montru kuraĝon, ili kriaĉas per timo kiel hundoj, kiuj rivecis batojn.“

„La ĉefo de la apaĉoj ne forgesu, ke ĉie ekzistas kuraĝaj kaj malkuraĝaj, bonaj kaj malbonaj homoj!“

„Vi pravas. Mi ne volis ofendi vin.“